



# aktuala

## 34-a ELDONJARO

Fondita en 1976 de Leo de Bruyne, informilo kaj oficiala organo de Esperantista Brusela Grupo, societo centjara neprofitcela fondita je la 10a de Februaro 1907, registrita en la belga ŝtata oficiala ĵurnalo "Belgisch Staatsblad, Moniteur Belge" kun la N°0 419 498 274, honorigita kiel "reĝa" societo ek de 29a de Majo 1957.

Redaktoro: Paulo Branco, 29 rue Froissart 1040 Etterbeek; Prezidanto: Angelos Tsirimokos, 405 av. Louise 1050 Bruselo; Kasisto: Claude Gladly, cgladly@arcadis.be, Abona membriĝo 10 eŭroj jare, konto EBG 000-0 123 048-52 Sekretario: Hélène Falk-Bracke, 7 avenue des Chênes, 1640 Rhode StGenese, informas +32 2 3584214, helene.falk@skynet.be; Kunvenloko n°2 rue Van Maerlant ĉiumerkrede 18h30-20h metroo MAALBEEK (tie nek poŝtkesto nek telefono). Informoj : ...

<http://users.belgacom.net/EBG> <http://ebg.skynetblogs.be> <http://uea.org> [www.esperanto.be](http://www.esperanto.be) [www.esperanto.net](http://www.esperanto.net) <http://eo.eventeo.net>  
Vidpunktoj de artikoloj en Aktuala Esperanto ne nepre spegulas opiniojn de ĉefa redaktoro aŭ de EBG - Esperantista Brusela Grupo

## ENHAVO

- Paĝo 2 - Hélène Falk-Bracke pri nepo de Zamenhof (unua parto)
- Paĝo 3 - Esperantaj Eventoj
- Paĝo 4 - Alberto Garcia, Paŭlo Moĵaev kaj alia poemaro
- Paĝo 5 - JOMO, J.M.Leclerc pri Gaskona Lingvo
- Paĝo 6 - Pola Esperantisto pri Gramatiko estas Facila
- Paĝo 7 - Kion diris Sinjoro Kabe
- Paĝo 10 - Kostiantyn Demianenko aŭtomobile al Francujo (unua parto)
- Paĝo 12 - Geraldo Mattos pri mia esperantisteco (tria lasta parto)
- Paĝo 14 - Raul Castro vizitas Moskvon

## PROGRAMO DE LA MERKREDAJ KUNVENOJ

### Junio 2009

- 3 Georges Sossois pri la Belga Konstitucio
- 10 Claude Gladly prokrastis sian prelegon al Aŭtuno
- 17 Lucien de Sutter rezignis prelegi pri BEFA pro memaj sanecaj kialoj
- 24 Seán Oriain pri "toastmasters"
- 27 Marc kaj Anne Demonty-Seghers invitas - (vidu sekvanta paĝo) - al sabata grupa tagmanĝo en ilia ĝardeno

### Julio kaj Aŭgusto : grupo ferias

### Septembro 2009

- 2 Semajna kunveno unua post grupa ferio dum Julio kaj Aŭgusto
- 9 Grupanoj aŭ ne, prelegontoj estas ege bonvenaj, bonvolu sin anonci
- 16 Semajna kunveno
- 23 Semajna kunveno
- 30 Semajna kunveno

## ZAMENHOF-STRATO, LIBRO PRI NEPO DE ZAMENHOF (unua parto)

Libro verkita de Roman Dobrzynski laŭ interparoloj kun Louis Christophe Zaleski-Zamenhof, la nepo de L. L. Zamenhof (eld. Varpas, Kaunas (LT), 2005, 2-a eldono).

"Krzysztof ZALESKI, naskita en Łomża" estas la nomo adoptita de Ludwik Zamenhof, filo de Adamo, post lia eskapo el la Varsovia getto, ĵus antaŭ transporto al Treblinka. Ludwik ZAMENHOF neniam konis sian avon L. L. Zamenhof, kiu mortis en 1917, 9 jarojn antaŭ lia naskiĝo; tamen la nepo heredis de la avo kaj daŭrigis lian poŝtmarkan kolektadon, kiu malaperis kun la domo ĉe strato Królewska en 1939. Sub nomo Zaleski li aktivis en la pola rezist-movado, kaj ne volis ke tiu nomo ne plu estu lia post la milito. Do, li decidis ke lia estonta nomo estos: Ludwik Krzysztof Zaleski-Zamenhof. Kiam li establiĝis en Francio, pro la nekapablo de la francoj deĉifri kaj prononci Krz... li francigis la personan nomon al Louis-Christophe – aŭ simple Chris por la amikoj. "Parizon kaj Varsovion mi sentas same miaj urboj", li diras. (daŭrigota)

Hélène Falk

## TAGMANĜO ĈE ANNE KAJ MARC DEMONTY EN DILBEEK

La jarfina renkonto de EBG okazos, ĉi-jare ĉe Anne kaj Marc Demonty en Dilbeek, **sabaton la 27-an de Junio inter la 12H30 kaj la 17H** proksimume. La domo situas en **Schoolstraat n°3** tre proksime de la ĉefa preĝejo de Dilbeek. Ĝi estas facila atingebla per aŭtomobilo elirante de la Ringo O je elirejo 13, poste sekvante la ŝoseon al Ninove (Ninoofsesteenweg). Je la tria trafiklumo oni turnu dekstren en la Verheyden straton, kaj tie oni prenu la duan straton maldekstren, vidalvide de la agentejo Fortis. Estas parkebleco en Verheydenstrato au proksime.

Per publikaj trafikiloj, sufiĉas preni la metroon ĝis stacio Gare de l'Ouest/ Weststation, kaj tie daŭrigi per la buso De Lijn 128 au 127 direkte al Ninove. Sabate estas 2 busoj hore. Plej facile oni eliru je la haltejo Dilbeek Stelplaats (Busgaraĝo, loko facile rekonebla), revenu kelkajn metrojn lau la ŝoseo, tiam prenu deklivan straton Molenberg (mallonge) poste tuj dekstre Roelandsveld. Iom pli fore estas stadio kaj dekstre restoracio (De Smidse) kaj tiam la sekva strato dekstre estas Schoolstraat.

La kunveno okazos laŭ la vetero en nia ĝardeno kaj sur teraso en trankvila kvartalo, estas antaŭvidita (serĉ) promenado arkitektura kaj natura en la tuj apuda centro de la komunumo kaj la parko. Laŭ eble Marc donos klarigojn pri la diversaj monumentoj kaj la loka birdaro.

Por eviti malŝparadon kaj havi bonan ekvilibron inter la pladoj, **ni pretas prizorgi malvarman bufedon** (viandan, fiŝan kaj vegetaranan) + desertojn kaj trinkaĵojn, petante **partoprenon de 7 eŭroj pageblaj surloke, au 3 eŭroj** por tiuj kiuj venus nur dum la **posttagmezo**. Se vi intencas partopreni la aranĝon, **nepre antaŭanoncu vin**, ĉu telefone al numero: **02.569.31.33** ĉu per retadreso: **demontyanne@yahoo.fr antaŭ la 20-a de Junio!**

Ni esperas revidi vin multnombrajn kaj estuziamajn je tiu okazo, sub blua ĉielo en duoble verda ĉirkaŭaĵo.

Anne kaj Marc Demonty en Dilbeek

## JUNULARA KONGRESO

La 65a IJK - Internacia Junulara Kongreso, okazos inter la 18a kaj la 25a de julio 2009 en urbo Liberec, Ĉeĥio, kun kongresa temo "libereco en ĉiuj ties formoj". La aranĝon okazigas kaj organizas kune Ĉeĥa, Pola kaj Germana Esperanto-Junularoj. Urbo Liberec situas 100 km norde de Prago, apud la ĉeĥa-pola-germana trilandlimbordo. Antaŭe okazos antaŭkongreso en Vieno, Aŭstrio, trajna karavano el Francio kaj bicikla el Szczecin, Pollando. Poste okazos karavano al UK Bjalistoko, kiun sekvos MIRO en Kroatio. Detalojn pri kongreso kaj kongresurbo serĉu en IJK-retpaĝaro <eo.wikipedia.org/wiki/IJK\_2009> kaj <www.tejo.org/ijk>

## ESPERANTAJ EVENTOJ

Je la 9a de majo, Stein Hautekees kaj Wim Depre (sidante skoltvestite en la fotoĵo), prezidantoj de SEL-Skolta Esperanto Ligo, organizis printempa promenado kun Bert Boon, prezidanto de La Hirundo Esperanto Klubo de Tienen (centre starante kun helbluaj ĵako kaj ĉemizo, verda pantalonon). Ankaŭ ĉeestis Guido Ricci-Morelli dumviva membro de EBG kaj estrarano de SEL-Skolta Esperanto Ligo.



Parto de la partoprenantoj dum la menciata printempa promenado



Agado de EBG je la 29a de Aprilo kun prelego de Delforge, kurso 1 de Françoise Pellegrin kaj kurso 2 de Angelos Tsirimokos



Marc Demonty prelegante je la 6a de Majo pri temoj de euroneroj de ĉiuj landoj



Bernard-Regis Larue prelegante je la 13a de Majo pri lastaj novaĵoj de la planedo Marso



Hélène Falk-Bracke je la 20a de Majo proponis kvizojn



Guido Ricci-Morelli kun filo Matteo dum printempromenado

## DUMVIVAJ MEMBROJ DE EBG:

**BRACKE Clara**  
**DECEUNINCK Herman**  
**DELLILE-MAES Nicole**  
**ERNST Elfriede forpasita**  
**KOVACIC Neven**  
**LARUE Bernard-Regis**  
**POTERUCHA Barbara**  
**RICCI-MORELLI Guido**  
**SPERBER Francine**  
**VAN DAMME Emile**

## VEKIĜI APUD VI

Mi vekigās inter la brakoj viaj.  
 Mi naskiĝas apud vi, kiel brila  
 mateno aperas en la fragila  
 nokto, per mateniĝa or-radiaj.  
 Vekiĝu de la sonĝoj senkonsciaj,  
 ke mi, en la naskotago jubila,  
 atendas vin, de post la maltrankvila  
 nokto pro l'sufersonĝoj agoniaj.  
 Alvenu, el via sonĝletargio,  
 al ĉi tiu realeca aŭroro  
 kie, mia espera nostalgio,  
 batas kun mia koro via koro,  
 per la plej belvekiĝa sinfonio  
 kiu alportos nin al l'amo-gloro.

Alberto Garcia Orive, Bilbao, Hispanujo

## MEVOJ

Flugas mevoj super maro,  
 Blankaj, blankaj mevoj.  
 Post ilia ĝoja aro  
 Flugas miaj revoj.

Blankaj mevoj flugas alte,  
 Alte super ondo,  
 Kaj senlace, kaj senhalte  
 Al mirinda mondo  
 Flugas miaj revoj,  
 Kiel blankaj mevoj...

Georgo Deŝkin

## ĜIS FIN'

...Ĉiam esti mi mem ĝis fin',  
 Ajnmomente ne tremimi morton  
 Lernas mi – lanug' instruas min...

K. Viŝljajev (K. Вижляев)

## POEMOJ DEDIĈITAJ AL IU MISTERA I.F.

De Paŭlo Mojaev, Simferopolo, Ukrainujo

Mi scias, ni ne tre proksimas, jes,  
 Nenion rajtas voli mi, atendi.  
 Sed viaj belo, ĉarmo kaj kares'  
 Devigas min ne plu de l' saĝ' dependi.  
 Do plu kun tiu ĉi besteĉjo restu  
 Por iomete pli feliĉa esti...

Malordinare varmas la aŭtuno,  
 Karesas arbojn milda, dolĉa vent',  
 La foliar' odora kaj maljuna  
 Jam brulas arde kun malfrua pent'...  
 Sed ne varmigas min aŭtuna flamo  
 Dum sen esper' forpasas mia amo...

Dum maldorm' en nokta hor'  
 Plorsuferas mia kor'.  
 Kio estas vi por mi?  
 Bela revo kaj ne pli...

L' laca kaj malsana mens'  
 Okupatas nur de l' pens':  
 Kio estas vi por mi?  
 Vana strebo kaj ne pli...

Ĉesu esti nur martir!  
 Lasu ama min delir!  
 Fartu bone, mia di',  
 Nur turmento kaj ne pli...

Ĉagrenita pri l' destin'  
 Vane mi liniojn rimas...  
 Ĉu mi timas perdi vin?  
 Jes, mi timas...  
 Malgraŭ la dolor' en l' sin'  
 Mi ridetas kaj petolas.  
 Ĉu mi volas perdi vin?  
 Ne, ne volas...  
 Kio do turmentas min?  
 Ĉu malsana subkonscio?  
 Ĉu mi povos lasi vin?  
 Mankas scio...

La ĉielon regas stela malproksimo,  
 Endormigas luna magi'...  
 Dormu do trankvile, kaj nenion timu,  
 Mi ja nokte preĝas pri vi...

Dum mateno foras, kial do rapidi,  
 Ĝuu sonĝojn dum nokt-ebri',  
 Ja nenio mava povas vin insidi,  
 Ĉar mi nokte preĝas pri vi...

Morgaŭ post vekigo kaptos vin feliĉo  
 Kaj ne trafos io ali',  
 Venos bona tempo, je la ĝojo riĉa  
 Ĉar mi ĉiam preĝas pri vi...

Dormu, mia kara, flugu sonĝpilgrime,  
 Dum ne vekis vin sun-radi',  
 Dormu do trankvile, kaj nenion timu,  
 Mi ja nokte preĝas pri vi...

Mi lasis la urbon, kvazaŭ mi lasus la tutan vivon,  
 Mi sidas sencele, triste rigardas fenestren ade...  
 Stultas sidado, sed kiun mi havas alternativon?  
 Nure sopiri pri vi laŭ frapado rada...  
 Morgaŭ degelos sopir' kvazaŭ iu benita sonĝo,  
 Sed retransviligon mi jam neniam sentos:  
 Aŭ dezirego vin ami min ade ronĝos,  
 Aŭ de la amo malreciproka teruroj turmentos...

Kiel tedas, kiel trudas mia triste trompa am',  
 Jen lascivas ĝi, jen prudas, sed ne ĉesas ĉi mort-flam'.  
 Tra nebul' de iluzioj logas min l' impeta streb',  
 Sed ridante la vizioj malaperas en disŝveb'...  
 Kaj mi preĝas plensenforta dumvespere kun ve-spir':  
 "Stopu! Haltu! Ĉesu! Mortu! Lasu min, ho am-delir'."

## TOTA LA LENGA GASCONA SUS UA PAGINA

1. Adiu - 2. Adishatz - 3. Praube òmi, que soi content de t' véser - 4. Quin vas? - 5. Va plan, e tu? - 6. Quin t' aperas? - 7. Que m' aperi Joan - 8. Ond demòras? - 9. Que demori a Bordèu - 10. Que hès en la vita? - 11. Que hèi lo esperantisto - 12. Quin atge as? - 13. Qu' èi dètz-e-nau ans - 14. E as dörilles? - 15. Òc, un hilh e ua hilha - 16. La hemna qu'ei bèra - 17. La Maria qu'ei brava - 18. Quina ora ei? - 19. Qu' èi mieidia, miejanueit, l'ua ora - 20. Que son las duas - 21. Que son las tres manca vint - 22. Que hè hred uei - 23. Lo vent que boha - 24. Garona qu'ei un arriu deus longs qui vien deus Pirenèus - 25. Hongria qu'ei un pais deus bèths - 26. Lo còp qui vien, qu' anarèi au campestre - 27. Que son los camps mei luenhès - 28. Qu'èi un vilatjòt deus tranquilles - 29. De maitin que'm lhevi - 30. De ser que'm vau dromir - 31. Que cau anar dromir de d'ora tà ne pas estar cansat - 32. De nueit en cò nòste, lo vent que shiula hens las teulas - 33. Aquesta pòrta qu'ei tan larja com lo cabinet - 34. Qu'i duas cadièras hens la cramba - 35. S'avèvi temps que minjari hromatge - 36. E t'agrada, l'armanhac? - 37. Tiò, hèra, mes lo vin tamben - 38. Que soi hart - 39. Lo gat que bèu lèit - 40. Acò rai! - 41. Tà diser la soa suspresa, lo son contentèr, o qué que sia, que cau diser: Hilh de puto! - 42. Acò n'ei pas mau, qu'ei la lenga de cada dia - 43. Au còp qui vien!

Gascona lingvo laŭ la fama kantisto JOMO - J.M. Leclerc  
Leclero de 13-04-2009, dum Kongreso de SAT-Amikaro

## LA TUTA LINGVO GASKONA SUR UNU PAĜO

1. Saluton (al unu) - 2. Saluton (al pluraj) - 3. Malfeliĉa homo (= kara amiko), mi estas kontenta vin vidi - 4. Kiel vi fartas? - 5. Bone, kaj vi? - 6. Kiel vi nomiĝas? - 7. Mi nomiĝas Johano - 8. Kie vi loĝas? - 9. Mi loĝas en Bordojo - 10. Kion vi faras en vivo? - 11. Mi estas esperantisto! - 12. Kian aĝon vi havas? - 13. Mi estas dek-nau jaraĝa - 14. Ĉu vi havas infanojn? - 15. Jes, unu filon kaj unu filinon - 16. La virino estas bela - 17. Mario estas afabla - 18. Kiu horo estas? - 19. Estas tagmezo, noktmezo, unu horo - 20. Estas la dua - 21. Estas tre horojn (sed) mankas dudek (minutoj) - 22. Estas malvarme hodiaŭ - 23. La vento blovas - 24. La Garono estas longa rivero, kiu venas de la Pireneoj - 25. Hungario estas bela lando - 26. Venontan fojon, mi iros al la kamparo - 27. Estas la kampoj plej malproksimaj - 28. Estas unu vilaĝeto (el la) trankvila(j) - 29. Matene mi leviĝas - 30. Vespere mi iras dormi - 31. Bezonas iri dormi frue por ne esti laca - 32. Nokte, ĉe ni, la vento fajfas en la tegoloj - 33. Tiu-ĉi porto estas tiel larĝa kiel la ŝranko - 34. Estas du seĝoj en la dormĉambro - 35. Se mi havus (imperfekto post se) tempon mi manĝus fromaĝon - 36. Ĉu al vi plaĉas armanjako? - 37. Jes, ege, sed la vino ankaŭ - 38. Mi estas sata, ebria, mi ne plu volas, ktp - 39. La kato trinkas lakton - 40. Tute ne gravas! - 41. Por diri sian surprizon, sian kontentecon aŭ ion-ajn, bezonas diri: filo de putino! - 42. Tio ne estas aĉe, estas la lingvo de ĉiu tago - 43. Ĝis la venonta fojo!

Foto de JOMO instruante la gaskonan :



5

6

## GRAMATIKO ESTAS FACILA

Gramatikajn klarigojn sekvos ĉiam konvenaj ekzemploj, danke kiuj vi povos efike profundigadi vian lingvokonon.

1. Multaj gesamideanoj ĝis nun ne scias, ke post **preferi** oni uzas **al** antaŭ substantivo kaj **ol** antaŭ infinitivo. **Preferi** signifas: decidiĝi favore al unu afero aŭ ago post komparo kun alia (=preferi ion **al** io). **Ekz.:**  
a) Si preferas buteron **al** margarino (=ĉi donas sian **preferon al butero**). Multaj homoj preferas kokinaĵon **al** porkaĵo. Maljunuloj preferas fiŝon **al** viando. Li preferas konjakon **al** vodko. Mi preferas poezion **al** prozo.  
b) Ni preferas manĝi **ol** trinki. Ŝi preferas danci **ol** dormi. **Lia patro preferis morti ol senhonorigi.** Multaj knaboj preferas ludi pilkon **ol** sidi hejme. Li preferas esti mortigata de la edzino **ol** esti pinĉata de la anasoj.

2. Ne ĉiuj rimarkas diferencan inter la verboj: **rigardi** kaj **vidi**, do indas klarigi tion: **rigardi** (=direkti sian vidon sur...), **vidi** (=percepti la bildojn...)

a) Dum fulmotondro mi **rigardis** tra la fenestro de mia ĉambro. Vespere estas agrable **rigardi** sur la maron. Li longe **rigardis** al ŝi en la vizaĝon kaj poste ili ambaŭ **rigardis** la stelplenan ĉielon. Ŝi neniam **rigardas** malantaŭen. Li **rigardas** ĉion tra sia persona vitro.

b) Somere oni povas **vidi** multajn velboatojn su Jamno-lago. Li **vidas** nur ĝis la pinto de sia nazo. Pro multo da arboj ni arbaron ne **vidis**. Ŝi jam blindiĝis kaj ne plu **vidas**. Gejunuloj **vidas** ĉion en roza lumo. En Esperanto mi **vidas** la estontan lingvon de la tuta mondo.

3. Estas ankaŭ diferenco inter la vortoj: **aŭdi** (=esti kapabla percepti ion per la oreloj) kaj **aŭskulti** (=atente uzi sian aŭdan senŝon, peni aŭdi ion).

a) Ĉiuj homoj havas orelojn, sed ne ĉiuj bone **aŭdas**. Ĉu vi **aŭdas** la birdojn kanti? Mi neniam antaŭe **aŭdis** pri tiu ĉi kantistino. Li **aŭdis** ion, kio ne estis dirita. En oktobro mi **aŭdis** pri subita morto de Gunter Ebert.

b) Kiu bone **aŭskultas**, tiu bone lernas. Li neniam **aŭskultis** konsilojn de instruistoj. Malĝentile estas **aŭskulti** sub la pordo. Ni **aŭskultis** lian prelegon kiel hinan predikon (=ne volante kompreni). Lia telefonia lineo

estis **subaŭskultata** de la polico.

**Subaŭskulti** (=kaŝe aŭskulti).

4. Ni neniam konfuzu la prepozicion **super** (=pli alte ol) kun la adverboj **supre**, **supre de** (=ĉe la plej alta parto de io). **Ekz.:**

a) La suno leviĝis **super** la teron. **Super** la tero sin trovas aero. La fiŝoj elsaltis **super** la akvon. La vesterata ombro etendiĝas **super** la kamparo. Multaj birdoj ĉirkaŭŝvebas **super** la arboj. Li sidas en ŝuldoj ĝis **super** la oreloj. Jam sepdek jaroj pasis **super** mia kapo.

b) **Supre de** la kongresejo flirtis verdaj flagoj. Mi loĝas **supre de** la domo (=en la plej alta etaĝo). **Supre** en la ĉielo moviĝas ankaŭ vivo. **Supre** staras sur la monto la silenta kapeleto. **Supre** de la kamentubo laboris juna kamenpurigisto. Lia forta voko sonis de **supre**.

5. Ne ĉiuj esperentistoj rimarkis diferencan inter la vortoj: "**turisto**, **turista**" kaj "**turismo**, **turisma**", sed la diferenco sendube ekzistas.

a) **Turisto** - estas homo ekskursema, amanta ekskursojn, vojaĝanta por plezuro aŭ sporto. **Turista** - estas io havanta rilaton al turisto: turista bagaĝo, dorsako, tendo, provianto, biciklo, ktp.

b) **Turismo** - estas vojaĝado kaj ekskursado por plezuro aŭ sporto. La vorto **turisma** rilatas al **turismo**, do ni skribas kaj diras: turismaj eldonajoj (prospektoj), turismaj oficejoj, turismaj kluboj, turismaj urboj, turismaj itineroj, turismaj atrakcioj, turismaj perspektivoj, ktp.

6. Vi mem diferencu vortojn **scii** kaj **koni** !

7. **Sinonimoj:**

**adepto** = ano, aliĝinto, samopinianto, disĉiplo

**admoni** = riproĉi, mallaŭdi, skoldi, instigi, persvadi

**adolta** = plenkreska, seksmatura, plenaĝa

**afabla** = bonkora, helpopreta, servema, komplezema

**arlekeno** = burleskulo, klaŭno, pajaco, bufono

**aroga aŭ aroganta** = impertinenta, malĝentila, senhonta, malrespekta

**babili** = klaĉi, vortmueli, konversaci

**bebo** = infaneto, lulinfano, suĉinfano

Revuo "La Pola Esperantisto", laŭ libro de Jaan Ojalo

**KION DIRIS SINJORO KABE?**

*Intervjuo kun la plej fama  
Esperanta stilisto, 24 Junio 1931*

“**Ho, Kabe,** Kabe, Kabe, kia mistermalica forto vin povis de ni preni rabe?” mi preĝe murmuris, kiam mi en malgranda strato eniras korton. Super mia kapo pendas minace nigra ĉielo, fulmoj zigzagas, tondro krakas. Ŝajnas ke la ĉielo koleregas pro mia aŭdace peka ideo: intervui lin! Kaj mia koro frapegas, kiam mi staras antaŭ la ŝildeto: *Dr. Kazimierz Bein*. Tiajn teruraĵojn mi aŭdis pri li, ke mi pensas, ke ĉiumomente la pordo malfermiĝos, aperos mistera homulo kaj per majstra bokso trafos mian verdan stelon, tiel ke mi falos malsupren la ŝtuparon kaj restos mortkuŝanta kun disfrakasitaj ostoj ... sed ne, miaj karaj, ne, la vizitkarto, sur kiu estas presita precize “korespondanto de Literatura Mondo-Budapest”, kaŭzas ke post duona minuto mi staras vid-al-vide antaŭ sinjoro Kabe!

Homo forta, kvindekjara, ĝentila gesto, sofo, unua demando en Esperanto: “Ĉu mi povas paroli al vi Esperante, sinjoro Kabe?”

Lia respondo en pola lingvo: “Bone, demandu Esperante, tamen mi respondos pole, ĉar mi jam longe ne parolis Esperante kaj eble kelkfoje estus malfacile por mi...”

Do ni parolas pole, kaj poste ofte interplektas Esperantajn vortojn, aŭ frazojn. Sinjoro Kabe ankoraŭ ne forĝesis la lingvon...

“Intervjuo?” li diras iom mirigite. “Ĉu estas ia senco en tio, skribi pri homo, kiu iam estis fervora Esperantisto kaj hodiaŭ tute forlasis la movadon? Ĉu vi opinias ke tio estos bona legaĵo por viaj legantoj?”

“Sed sinjoro doktoro, kvankam vi ne estas plu inter ni, restas via nomo, viaj verkoj. Vi estas historia figuro: kiu jam ne vivas, kaj ni ĉiuj — precipe la literaturistoj — bedaŭras tion”.

**Post tiaj enkondukaj vortoj** ni komencas interbabili. La teruraĵoj estas tute malveraj. Li estas tre afabla, samideana, ni diskutas pri lingvaj problemoj dum du horoj, la fulmoj plu zigzagas, la tondro krakas, la pluvo torentas. Junulo, reprezentanto de la postmilita movado, kaj maljunulo, eksbatalanto kaj eminentulo, sidas unu kontraŭ la alia. Kaj jen, jen mi sentas tute strange la eksterordinarecon de la momento: tra la ĉambro blovas la spirito de la jaro 1910!.. “Dum sep jaroj mi estis Esperantisto (1903–1910) kaj kvar kongresojn Boulogne s. M., Cambridge, Genève, Dresden mi ĉeestis kaj laboris dum 4-5 horoj ĉiutage por Esperanto ekster mia profesia okupo. La “Faraono”-n mi tradukis dum duona jaro, komparante la polan originalon kun la franca traduko. Komence mi pripensis ĉu traduki “Quo vadis”, sed la “Faraono” estis pli facile tradukebla. Kiam mi tradukadis, mi tradukadis seninterrompe, forlasante kaj kruccsignante malfacilajn frazojn aŭ esprimojn. Ilin mi poste speciale esploris helpante min per germana, rusa kaj franca vortaroj. Sed venu kun mi, sinjoro, tuj mi montros al vi interesan restaĵon el miaj Esperantistaj tempoj...”

Ni transiras en lian laborejon. Mi estas scivola kaj ĉirkaŭrigardas. Li haltis antaŭ la skribtablo kaj diras: “Jen mia eltrovaĵo! Tiu ĉi skribtablo jam kvarfoje estas alikonstruita laŭ mia deziro, meze la maŝino, ambaŭflanke specialaj klapoj por vortaroj kaj tradukaĵoj, la tutaĵo estas kunmetebla. Tre sprita kaj bela, ĉu ne? Iu amiko iam skribis noveleton pri tiu ĉi mia skribtablo — la Esperantisto Krukowski — kaj priskribis la ĉagrenojn de la lignaĵisto, kiu devis fabriki tian kuriozan skribtablon. La historio finiĝas en frenezulejo... bedaŭrinde mi perdis la manuskripton...”

**Mi volas fari kelkajn demandojn** al li, sed li vigle plurakontas. Ofte li perdiĝas en detalojn, jen pri la stilo pri sia propra

vidpunkto koncerne la malperfektecon de Esperanto, jen pri personaj travivaĵoj.

“Por havi bonan stilon, nepre estas necese koni minimume tri diversajn lingvojn, al si malparencajn. Kial ekzemple ni havis inter la slavoj tiom da bonaj stilistoj? Ĉar ili ĉiuj scias minimume du lingvojn! Mian simplan stilon mi multe dankas al mia rusa instruisto, kiu ne toleris du akcesorajn frazojn sinsekve. Li estis terure pedanta, sed li sukcesis alproprigi al mi facilan stilon kaj simplan esprimmanieron. Ekzemple mi evitadis en miaj verkoj laŭeble la kunmetitajn formojn *estas -inta, estis -inta*, kaj uzis simplan *-is*. La tradukado de bonstilaj literaturaĵoj, precipe polaj, formis la lingvon Esperantan —”

“Kaj la originala verkado?”

“Mi kredas ke la lingvo profitas pli multe per tradukado ol per libera originala verkado. La originala verkisto ĉiam iel povos “eltiri” sin, li simple ne uzos malfacilajn esprimojn aŭ simple ellasos aŭ aliajn donos... sed—” li interrompas sin, “kiel ĉio ĉi povus vin interesi? Mi ne estas plu Esperantisto, tion vi nepre akcentu en via intervjuo, eĉ mi havas ideojn tute nefavorajn al Esperanto, tamen mi ne volas malkuraĝigi vin per miaj paroloj: batalu por via afero!”

El mia buŝo volas elflugi cent demandoj. Kial tiu ĉi afabla sinjoro, kiu senĉese rakontadas al mi pri la glora kaj samtempe malfacila pasinteco de la lingva suĉinfano Esperanto, kial li, la patro de la esperanta stilo, li, de kies lipoj ni lernadis uzi la lingvon, diable — fulmtondre — *kial* li ne estas plu inter ni...???

Ĉar — jes — tion precize li diris! — ĉar laŭ lia opinio *Esperanto ne progresas...*! Hoho! Tiu ĉi sinjoro Kabe, kiu estas tia meritplena veterano el la taĉmento 1903, malgraŭ sia absoluta izoleco eksentas de tempo al tempo la “verdano blovon” de la nuntempo. Jen iu gazeteto, libreto ekflugas sur lian skribtablon. Li scias ekzemple, ke nun mortis nia kara Prof.

Cart kaj... kaj... sed tio restu sekreto!.. en la jaro 1927 li ekturnas la butonon de sia radioaparato! Liajn orelojn atingas la voĉoj de la Esperantistoj kunvenintaj dum la Varsovia Postkongreso en la Urba Salono, dissendataj de la Varsovia stacio! “Kvazaŭ mi estus denove en Esperantujo...” li rakontas. “Ili restis la samaj, kvazaŭ mi forlasus hieraŭ Esperanton, nenio ŝanĝiĝis, ili parolas, paroladas, paroladas ĉiam la samon, ĉiam la samon... Komprenoble estis ja kelkaj, kiuj parolis kun senco kaj sciis paroladi...”

**Li mantuŝas sian buŝon** kaj mentonon kvazaŭ enpense kaj diras: “La Esperantistoj, jes, ili havas multajn mankojn. Antaŭ ĉio ili ne scias sian lingvon! Ili tiel malbone parolis! (ekzemple, sur ŝipo sur Geneva lago), ke mi petis paroli al mi en nacia lingvo kaj mi respondos Esperante. Mi memoras dum iu universala kongreso diversajn paroladetojn. Ĉiu pledis per sia profesio: do pastro, ke Esperanto estas nepre necesa por pastroj, oficiro ke por oficiroj, komercisto ke komercistoj lernu Esperanton ktp. kaj poste mi parolis: Mi opinias ke Esperanton plej necese devas lerni la Esperantistoj mem!.. kion kvitancis la kongreso per granda aplaŭdo”.

Sinjoro Kabe estas tiel diskreta ne demandi min pri la hodiaŭa stato koncerne la perfektecon de niaj karaj samideanoj. Ho, tiuj “verduloj”! Kabe komencas rakonti pri la strangeco de la tipoj, kiaj amase svarmas en nia movado. Sed poste li denove interrompas.

“Sed kial mi rakontu al vi tiajn malkuraĝigajn aferojn? Mi ja estas ne plu Esperantisto, eĉ kontraŭulo via! Tamen, kara sinjoro, mi ne volas malhelpi la Esperantistojn: batalu por via afero!” li diras kun ĝentila gesto.

Iam venos, li pensas, nova geniulo, kiu kreos la veran solvon de la lingvo-problemo. Esperanto ja ne estas tiu ĉi solvo. Eble ĝi — tiu mistera plej logika

kaj internacia lingvo — venos baldaŭ, eble post 100 jaroj, ĉu li scias? Sed Esperanto...

Tamen, ne malkuraĝiĝu, diras la kontraŭulo Kabe en la jaro 1931, batalu por via afero, Esperantistoj!.. Kaj... *Esperanton plej necese devas lerni la Esperantistoj mem!* — li diris en la jaro 1906!..

**Dum la pluvo torente fluas**, fulmoj de tempo al tempo heligas la krepuskan ĉambron, ni parolas pri la malnovaj pioniroj. La Majstro...

“Jes, se oni prenas la unuan broŝureton de Zamenhof, kaj trafoliumas ĝin, oni konstatas facile, kiom da laborego kaj talento de plej diversaj stilistoj estis necesa por krei la lingvon envere. Zamenhof toleris ĉiujn disputojn pri lingvaj demandoj... cetere laŭ mia opinio la tuta lingvo por li estis nur rimedo. Por Zamenhof — kaj mi tre bone lin konis — ĉiam estis grava nur la ideo, tiu lia homaranismo. Ĉion alian li toleris, ĉar li devis... Kiel stilisto li estis bonega, ĉar li havis lingvon eksterordinare simplan...”

“Kaj Grabowski?”

“Mi konis lin bonege. Li havis tiun mankon, ke ĉio kio estis skribita, estis por li sankta. Se li ekzemple pli poste konstatis, ke ĝi estis malbona aŭ erara, li ne povis decidiĝi ŝanĝi ĝin...”

“Kaj vi jam ne ĝisvivis la tradukon de Pan Tadeusz?”

“Ne, tiam mi ne estis plu Esperantisto, tamen mi ricevis la libron kaj havas ĝin. Grabowski ĉiam havis jam la ideon, traduki sian amatan Sinjoron Tadeon. Tio estis ja freneza laboro, des pli ke Grabowski treege fajlis kaj tre precize tradukis, ĉiun vorton pripensis...”

“**Pri la Esperantaj poetoj**, kion vi pensas ĝenerale? Mi bedaŭras ekzemple ke vi ne konas niajn nunajn hungarajn poetojn...”

“La poetoj?” ekparolas Kabe tre vikle. “La poetoj — mi nun parolas de via Esperanta vidpunkto — tio estas danĝeraj homoj por la lingvo — tre danĝeraj! Ili

permesas al si plej diversajn formojn, kiuj ne sekvas ofte ĝustajn regulojn de la gramatiko. Ĉu oni ne povas verki senerare?”

“Mi ne konsentas”, mi diras, “mi ne trovis en la nuna poezio tiajn erarojn, pri kiuj vi parolas—”

“Sed tio ĉi estas ja tute komprenebla, ke la poetoj povas permesi al si diversajn «liberecojn»...”

Kaj post mallonga paŭzo de pripensoj li aldonas: “Ĉu vi scias, sinjoro, se mi estus tia via komisaro, mi entute malpermesus tiujn poetojn!..”

Mi ne scias, ĉu li diras tion ŝerce aŭ serioze. Mi rakontas al li pri la hodiaŭa Esperanta literaturo. La lingvo progresis de la jaro 1910. La libro de la jaro 1931 estas skribita en alia evoluinta lingvo. Volonte li akceptos min denove, volonte li orientiĝos en la lingvo de la nuntempo kaj tralegos iun originalan novan verkon kun plezuro...

“Ho, Kabe, Kabe, Kabe! Ni lernis de vi lernantknabe kuiri en la stiletorto! Kaj nun vi miros gape, strabe pri nuna Esperanta vorto!” mi murmuris paŝante malsupren la ŝtuparon. La duhora diskutado pri lingvaj demandoj, kiujn mi bedaŭrinde ne povas ĉi tie citi, ankoraŭ zumas en miaj oreloj!

Li — tion mi sentas en mia subkonscio — ne revenos plu al ni. Eble kiam Esperanto eksonos en ĉiuj lernejoj, kiam Ligo de Nacioj diskutos nur en Esperanto, ĉu mi scias?..

Mi nenion scias. Mi nur scias, ke la torenta pluvo malsekigas min ĝis-haŭte en tiu ĉi memorinda vespero, kiam mi havis la aŭdace-pekan ideon intervjui lin, tiun unikan eminentulon, kiu restis mortkuŝanta sur la verda bataalkampo!..

Edmund kaj Jan Fethke, *Literatura Mondo*, Varsovio, 1931 №7, la tekston skanis kaj enretigis Aleksander Korjenkov, kiu korektis kelkajn evidentajn miskompostojn. Kontrollegis Halina Gorecka. <http://ttt.esperanto.org/Ondo/H-kabe.htm>

### **Proverbo:**

**Mont' al monto ne venos,  
sed homo homon renkontos.**

## **AŬTOMOBILE AL FRANCUJO (unua parto)**

**Mi estas Kostiantyn Demianenko**, ukraina sciencisto-ihtiologo (kaj esperantisto samtempe), kaj sube mi iomete rakontos pri la aŭtovojaĝo, kiun ni kun mia edzino Jana realigis marte-aprile de ĉi jaro 2009.

La vojaĝo okazis laŭ afabla invito de Esperanto-France. Tio estis prelegvojaĝo, en kiu ni venis al diversaj urboj de Francio por prelegi per Esperanto pri tiuj aĵoj, pri kiuj mi spertas - pri ekologio kaj fiŝoj de Azova maro (kiujn mi esploras jam dum multaj jaroj), pri Ukrainio, ĝiaj tradicioj, rimarkindaĵoj kaj nuntempa vivo.

Kiel veturilo ni elektis nian familian aŭton (Skoda), kiu jam estis ekzamenita per pasintjara 3-semajna vojaĝo en 12 eŭropaj landoj. Kial aŭto? Ĉar evidentiĝis, ke por la paro tiu vetura maniero estas la plej malmultekosta kaj krome ĝi plej bone taŭgas por memstare esplori landojn, en kiuj ni vojaĝas. Ni ne bedaŭras, ke tiel faris. Ni multe sukcesis, multe vidis, tamen finfine ni komprenis, ke nia ferio estas tro mallonga, kaj ni devos vojaĝi kaj vojaĝi plu...



### **La vojo.**

Ni havis ne tiom multe da tempo por fari nian vojaĝon, nur tri semajnoj por fari vojon al Francio, vojaĝi ene de Francio kaj reveni hejmen. Pro tio ni strebis veturi kiel eblas pli rapide. Kaj la plej malfacila tago en la tuta nia vojaĝo estis la unua tago, dum kiu ni pasigis pli ol 1500 km per vojoj de Ukrainio (de orienta al okcidenta limo de la lando - el Donecko al ĉelima Berehove tra Poltavo, Kyivo, Jytomyro, Rivne, Lviv). Vojoj en

Ukrainio tradicie ne estas tre bonaj, sed post malvarma kaj neĝa vintro ie de ie ili estis vere teruraj. Eble estis la lasta fojo, kiam ni faris tiun vojon dum nur unu tago. Estonte ni planos 2 tagojn por veturi en Ukrainio, almenaŭ antaŭ tiu tempo, kiam oni faros bonajn vojojn. Ekzistas tamen espero, ke tio okazos, ĉar en la jaro 2012 Ukrainio akceptos Eŭropan futbalan ĉampionaton, kaj al tiu evento oni en la lando dediĉas multajn fortojn kaj financajn resursojn.

**Kompare kun la unua**, nia dua vojpeco (de Berehove al aŭstria Salzburgo estis ripoziga). Ni veturis iomete pli ol 800 km per bonaj vojoj de Hungario kaj Austrio, preterveturinte belan Budapeŝton. La lastan pecon de nia alfrancia vojo ni veturis en Austrio kaj Italio, plejparte en belega montaro. Tiutage ni iomete pli laciĝis, ĉar tiu longa vojo (iom pli ol 1000 km) ne estis rektodirekta, ofte turniĝis, supren- aŭ malsupreniris.

Por atingi Francion ni decidis uzi ĉiujn specojn de vojoj, inkluzive pripagaj, ĉar havis ne tre multe da tempo por veturi ĉirkaŭ 3500 km. Sed post kiam ni venis al unua Francia urbo (Romans) ni veturis preskaŭ ĉie per senpagaj vojoj. Ni devas esprimi respekton al francaj vojoj, kiuj laŭ niaj impresoj eĉ en profunda malurbaro estas tre aŭ sufiĉe bonaj. Ni neniam trafis en situacion en Francio, kiam vojo finiĝus per malvojo, per iu kampo aŭ arbaro. Do, mi ĝuis de stirado kaj iam de iam spektis ĉirkaŭantajn belaĵojn. Ofte mem vojo estis tre bela. Precipe nin plezurigis montoj kaj rokoj de Mediteranea bordo. Kiel belaj rimarkindaĵoj restis en la memoro viaduktoj apud Millau kaj Havro. Dankon al Francio pri multaj kilometroj de komfortaj, plezurigaj vojoj. Ne nur ni, sed ankaŭ nia aŭtomobilo ripozis...

**Nia rea vojo** de Francio al Ukrainio estis iom pli longa. Dum du tagoj ni gastis en Bruselo ĉe nia amiko Paulo Branko, dank' al kiu dum tiuj du tagoj ni konatiĝis kun belaj belgiaj urboj Brugge, Oostende kaj Namur, havis okazo ĉeesti varma amika rondo de Esperantista Brusela grupo. Poste ni veturis pli ol 1300 km (en Belgio, Germanio kaj

Pollando) de Bruselo al Krakovo. Ni veturis per tre bonaj aŭtovojoj. Antaŭlasta tago de nia vojaĝo estis la plej malrapida. Dum la tuta tago ni sukcesis veturi nur 560 km. La vojo estis malbona en Pollando (preskaŭ ĉie estis aŭtovojaj reparlaboroj) kaj en Ukrainio. Krome ni perdis ĉirkaŭ 2 horojn ĉe Pollanda-Ukrainia limo. Finfine malfrue vespere ni laciĝintaj haltis en unu motelo apud Rivne. Kaj sekvontage ni veturis lastajn 1100 km. Entute dum tri semajnoj ni veturis ĉirkaŭ 9700 km... Dum nia vojaĝo ni ne perdiĝis dank' al nia GPS-navigilo, kies voĉo estis kvazaŭ voĉo de nia tria virtuala amiko, kiu ĉie jam estis kaj preskaŭ ĉion konas pri la lando, kie ni estas novaj gastoj.



### Geografio de nia vojaĝo.

Ni venis al Romans nokte la **16-n de marto** 2009, post longa vojo tra montaro de Austrio, norda Italio kaj Francio. Jam nokte ni trapasis Grenoblon, kiu eĉ en mallumo aspektis bela, kaj ni decidis iam reveni kaj speciale dediĉi tempon por konatiĝi kun tiu ĉi urbo.

La **17-n de marto** ni vizitis muzeon de ŝuoj en Romans. Estis interesa ekskurso, kiu treege impresigis Janon. Poste estis la prelego kaj vespermanĝo en la klubejo en amikema esperanta atmosfero.

La **18-n de marto** ni vojaĝis al La Ciotat, kaj preskaŭ tuj post la alveno okazis nia prelego, kiun aŭskultis esperantistoj kaj neesperantistoj. Estis agrable, ke la prelego pasis vigle, kaj estis multaj profesiaj demandoj, ekzemple multaj de Raphaele Leguen vic-urbestrino de La Seyne - franca ĝemelurbo de mia urbo Berdiansko en Ukrainio.

11

Dank al afabla kaj gastigema Renee Triollee la **19-n de marto** ni vizitis La Seynon, antikvan vilaĝon Le Castelet kaj ĝuis atmosferon de La Ciotat, spektis aron de belaj ŝipetoj en la apuda maro.

La **20-n de marto** ni faris vojon al hejmo de Serge kaj Monique Eysseric en Montferrier (apud Montpellier). Laŭvoje al Montferrier ni pjedpromenis en Martigues kaj Arles. Vespere de la sama tago ni kun Serge kaj Monique vizitis havenon Palavas kaj spektis belegan koncerton de klasika muziko en Montpellier.

La **21-n de marto** ni dediĉis al promenado en Montpellier (en kiu por ni ĉiĉeronis amikoj-geesperantistoj), tagmanĝis en la domo de Serge kaj Monique en esperanta amika rondo. Poste okazis la prelego, kaj poste ni kune vespermanĝis en ĉina resporacio en Montpellier. Estis tiu tago, kiam mi unuan fojon gustumis ranon (rostitan). En Ukrainio ranon opiniis kvazaŭ nacia manĝaĵo de francoj. Ĉu vere? Mi ne scias, sed ŝajnas ĉi tiu ĉe la tablo diris, ke neniam gustumis ranon. Mi ankaŭ ne diru, ke al mi tre plaĉis la manĝaĉo, sed almenaŭ nun mi sentas min pli franco ol antaŭe. Ni bedaŭras, ke tempo ne sufiĉis por ekvidi olivarban ĝardenon de Serge kaj Monique. Laŭ fotoj kaj rakontoj ĝi estas vere impresiga.

La **22-n de marto** ni veturis direkte de Villeneuve d'Aveyron. Laŭvoje ni spektis impresigan viadukton apud Millau kaj promenis en vilaĝo Sanvensa. Vespere de la sama tago okazis nia prelego, post kiu ni kun Andre Andrieu kaj lia edzino Polett vizitis kastelon Najak.

La **23-n de marto** ni promenadis en antikva kaj bela Villeneuve, estis en Villefranche kaj vojaĝis por spekti belajn naturajn memorindaĵojn de la regiono. Fine de la tago ni ricevis mirindan ekskurson en persona muzeo de Andre (temas pri muzeo de malnovaj aĵoj).

La **24-n de marto** estis vojaĝo al St Foy La Grande. En la sama tago okazis nia prelego, kaj ni iomete spektis la urbon.

Sekvontage, la **25-n de marto** mi kun Marie-Helene Desert vizitis lernejon, kie en du infanaj grupoj rakontis pri Azova maro kaj Ukrainio. Estis tre agrabla komunikigo,

12

dum kiu mi vidis sinceran intereson de infanoj. Mi pensis pri tio, ke jen estas bonega sperto de uzo de Esperanto... Aliun parton de la tago ni kun Jana uzis por viziti kastelon Duras, belegan urbon Bordeaux kaj aĉeti famajn francajn vinojn en vilaĝo Le Fleux, kiu situas apud St Foy La Grande.

La **26-n de marto** ni vojaĝis al St Nazaire, uzinte eblecon promeni en preterveturanta Nantes, kiu forte impresigis nin per belega arkitekturo. Vespere ni venis al domo de Cantal kaj Patrik Barret, kaj poste veturis kun ili al la klubejo, kie nin atendis varma amika rondo de geesperantistoj. Samvespere ni veturis al la haveno kaj spektis noktajn lumojn. Estis tre bele.

Sekvonta tago - la **27-a de marto** - estis riĉa per turismeroĵoj. Ni promenis en St Nazaire, poste vojaĝis laŭ la marbordo, ekvidis salajn laĝetojn kaj antikvan Guerandon. Vespere en la domo de asocioj okazis nia prelego por esperantistoj kaj neesperantistoj.

Matene de la **28-a de marto** ni startis al St Malo. Laŭvoje haltis kaj iomete promenis en Rennes. Posttagmeze ni atingis domon de Anne-Marie Argney, kiu proponis kaj realigis nian promenon en malnova parto de St Malo. Kaj malfruvespere ni havis okazon ekvidi kio estas alta tajdo en St Malo. Ni neniam vidis ion similan dum la tuta vivo kaj ricevis neforgeseblan impreson...

La **29-n de marto** ni kun Anne-Marie vizitis apudan urbon Cancale kaj gustumis ion el "fruktoj de la maro", poste okazis la prelego, kaj poste promenado kun gesamideanoj, kiuj venis al la prelego el Rennes.

La **30-n de marto** ni startis frumatene al Mont St Michael, kie ni ekvidis belegan konstruaĵon kaj miloj de turistoj (nenie dum la tuta vojaĝo estis pli multe; mi povas imagi, kio okazas ĉi tie somere dum periodo de ferioj). En la sama tago estis Caen, kiun ni malfermis por ni dank' al Yves Nicholas. Tio, kion li sukcesis montri dum nur unu horo, lasis fortan impreson kaj deziron konatiĝi kun la urbo pli.

Vespere de la tago ni lasis gastigeman kaj jam ne tiom nekonatan Francion... daŭrigota.

Kostiantyn Demianenko, Berdiansko, Ukrainio

### MIA ESPERANTISTECO (tria lasta parto)

En la domo de Iŝmael mi faris miajn elementajn studojn de Esperanto sub lia aminda kontrolo kaj sub la severa regado de Porto Carreiro Neto, kiu apartenis al la grupo de la plenaj konantoj de la stilo de Zamenhof. Ĉar li vidis, ke mi jam bone parolas kaj skribas en Esperanto, li konsilis al mi iri al BEL - Brazila Esperanto-Ligo - por submetiĝi al la ekzamenoj. Mi iris tien kaj en unu sama tago de 1953 mi estis aprobita en la elementa, en la supera kaj en la magistra ekzameno. La tiama Preezidanto de BEL, Carlos Domingues, unua brazilano en la Akademio de Esperanto, subskribis miajn atestojn kaj varme gratulis min, ĉar mi estis la unua, kiu faris ĉion unutage. Mi aldonu, ke mi studis por tiaj ekzamenoj dum pluraj monatoj...

La domo de Iŝmael verkigis al mi miajn du unuajn librojn: La tento de la junulo kaj Ivan VI, ambaŭ de 1953. Kaj restis interrompita kaj nun perdita mia dua tragedio pri unu el la brazilaj flagistoj, kiun Porto Carreiro Neto proklamis pornografia... Inter citiloj, **bandejranto** aŭ **flagisto** estis aventuristo de la kolonia urbo Sankt-Paŭlo, kiu iris al la landinterno de la tiama Brazilo por sklavigi indianojn kaj serĉi multekostajn ŝtonojn dum tiuj ekspedicioj nomataj bandeĵoj (bandeira: flago). Unu el ili restis tiom da tempo kun sia grupo, ke unu el liaj filoj ribeliĝis: la patro lin pendumigis...

**Kaj mi devas fini** per mia dua malobeo al Iŝmael. Dum nia trijara leterado, la temo pri religio ne estis tuŝita, sed mi tuj sciigis, jam en la unua semajno, ke li estis spiritisto. Multaj el la libroj pri Spiritismo, precipe la fundamentaj sub la plumo de Allan Kardec, estis jam tradukitaj en Esperanton, kaj mi legis ilin atente ne nur kiel religiajn librojn, sed ankaŭ kiel modelojn de bela kaj bona lingvo, ĉar tradukitaj de Porto Carreiro Neto kaj de Ismael Gomes Braga. En la fino de la jaro, mi apostatis, kaj fariĝis spiritisto pro la libroj kaj pro la ekzemplo pri boneco, kiun donis al mi Iŝmael. Kiam mi tion komunikis al li, li energie penis deteni min de mia decido:

- Ne faru tion, Geraldo. Spiritismo jam havas por si multe da fervoraj propagandistoj, sed ne Esperanto: restu nur kun Esperanto. Por tio vi naskiĝis, kaj tio estas via tasko en via nuna vivo sur la tero!

**Mi fariĝis spiritisto**, sed ne okupiĝis pri religiaj aspektoj. Aroganta kiel multaj junuloj, mi skribis al Frato Tadeo mallongan leteron, kiu respondis al mi egale mallonge:

*Agudo, Kristnaskon de 1953*

*Mia bona Geraldo:*

*Vi estas azeno.*

*Pacon kaj bonon,*

*Frato Tadeo*

En la 13-a de Marto 1954, Daisy Angelina Carnasciali kaj Geraldo Mattos Gomes dos Santos geedziĝis, kaj iom poste ni translokiĝis al Kuritibo, kie loĝis ŝiaj gepatroj: Ŝi tiam trapasis malfacilan gravedecon. Kaj en la dimanĉo de la brazila karnavalo naskiĝis la sekvantan jaron Ludoviko Carnasciali dos Santos, mia unua filo, nun doktoro pri Lingvistiko per tezo pri la indiĝena Sujaja lingvo kaj direktoro de la Sektoro pri Homaj Sciencoj en la Londrina Ŝtata Universitato de Paranao. Iŝmael fariĝis denove korespondanto, sed lia homeco akompanas min dum mia tuta vivo kun instigo al la verda laboro.

**En Kuritibo**, mia vivo estis malfacila: neniu novaĵo, ĉar ĉiu komenco estas atenco al la sorto, kiun jen ni trafas, jen ni maltrafas... Kaj dum kelkaj monatoj loĝis kun ni Gersi Alfredo Bays en egala malfacila situacio: provi la sorton... Kiam li vidis la nian, li decidis reveni al sia naskiĝa ŝtato. Kaj unu matenon ni strangumis, ke li ne venas al la kafo de la mateno. Pli malfrue, ni ektimis kaj iris al lia ĉambro: malplena, krom per letereto. Li kaj mi ekde la seminaria epoko estas ĝemelaj animoj: Ĉu estas mirinde, ke unu el liaj filoj nomiĝas Geraldo?! Iel kaj iele, nia interanimeco similas al tiu de Kalocsay kaj Warinĉien, kaj do miaj legantoj povas nun imagi mian kontentecon, kiam li fine eniris en la Akademion de Esperanto, la kvina brazilano. La tria estis Sylla Chaves, poeto kaj verkinto de gravaj libroj por la instruo de Esperanto, kaj la kvara estis nia karmemora amiko Leopoldo Henrique Knoedt, al kiu ni ŝuldas la tradukon de La Luzidoj, epika poemo de Kamoenso, unu el la majstroverkoj de la portugala literaturo kaj de la monda. Li omaĝis min (Leopoldo, ne Kamoenso) per la peto de prezento de la originala verko kaj de ties traduko, por kiu mi tradukis du el liaj sonetoj (de Kamoenso, ne de Leopoldo), krom klarigo pri la cirkonstancoj kaj la enhavo de la Kamoensa

13

epopeo (Kamoensa, nur por eviti la ripeton ĉe uzata posesivo: de Kamoenso, ne de Leopoldo).

La translokiĝo perdis al mi unu jaron de mia kurso pri Latinidaj Lingvoj en la Universitato de Brazilo, kaj mi devis ĉion refari ĉi tie (1955-1958) en la nun Pontifika Katolika Universitato de Paranao. Kaj sekvis la epoko de la konkursoj ... (1958 ĝis 1986).

**Mia dua ĝojo per Esperanto** estis mia eniro en la Akademion de Esperanto en 1970, sekvata per miaj reelektito en 1979, en 1988, en 1997 kaj en 2006... Kaj *il va sans dire* pri mia plaĉo esti elektita ĝia prezidanto en 1998. Mi estis reelektita akademiano en 2006, sed rezignis la prezidantecon.

Mian profundan dankon al Zamĉjo pro lia Esperanto kaj lia kredo mi devas publike konfesi per persona provo de la valoro de tiu miraklo. Mi vidiviĝis en 1983, kaj unu monaton poste mi jam amindumis, kvazaŭ nenio okazis... Kaj unu plian monaton poste atakis min astmo, tiu sama astmo, kiu mortigis mian edzinon, ĝemofara gastrito, kiu mortigis mian manĝovolon, kaj mortoveka depresio, kiu puŝis min al memmortigo... En tiuj teruraj tagoj, mi rigardadis al la du metroj da miaj portugallingvaj libroj, kaj vee ekkriis al mi mem:

- Ho mi malhonesto! Tiuj libroj estas sola trompo, tuta falsajo kaj vera nenijaĵo...

Kaj mi poste turniĝadis al la dudek centimetroj da miaj Esperantaj libroj, kaj sentis benitan mielon flui tra miaj vejnoj:

- Ho ja! Tiuj libroj iom valoras...

**Sekve de tio**, mia vivofilozofio estas tre simpla. Ekzistas Dio kaj Zamĉjo. Mi penas ami ilin kaj sekvi iliajn sulkojn. Mia privata vivo tamen estas mia epopeo kaj mia tragedio. Krome, mi jam faris grandajn erarojn en mia vivo, ĉar estas preskaŭ neeble al mi nei kaj negi... Mi preferas silenti, kaj tiu silento jam multe malutilis al multaj... Kaj precipe al mi mem. Kulpas ne mi, sed la kutimo kaj la kulturo. Kaj tio estas unuj el miaj plej grandaj difektoj: Ĉiam havigi al mi ĝustan senkulpigon. Kia la nun prezentata per la monda proverbo: *Kiu silentas, tiu konsentas*.

**Kaj mi nun parolos** pri mia dua disrevido kaj disrevido, kiun multaj el miaj amikoj kaj misamikoj kredas mia manio: la reguloj pri la participoj, kiuj estas tiel mavaj kaj mevaj de la realeco (duba frazo, kiun mi rektigas: la

14

reguloj, ne la participoj), ke nur ili povas klarigi al ni, kial falsas ilian uzadon ĉiuj korifeoj de Esperanto, kun la nobla escepto de nia Zamĉjo. De Stefan Maul al William Auld, multaj ofte mistrasas la ĝustan formon de la participoj, sed ne pro ilia propra kulpo, sed pro profesoraj proponoj de reguloj, kiuj estas simplaj, sed erarigaj!... Mi akuzis ilin, kaj mi dodevas pruvi:

*-William Auld, en Antaŭparolo al LA ŜTONA URBO. Antwerpen, FEL, 2000, p. 11: Eĉ en la diversaj romanoj pri Spartako kaj la ribelintaj sklavoj mankas fakte tiu perspektivo.*

*-Stefan Maul, en MONATO, p. 5, februaro 2007/2: Pro severaj kontroloj pro histerio pri terorismo ni estis traktitaj kiel krimuloj arestataj.*

Unu el la evidentaj erarigoj venas de la estinta verboformo finitiva, kiu estas dusenca, sed tion Esperanto neglektas. Por apogo al tia neglektado, mi kaptas unu el la propozicioj de la nuna tekso ne sub mia plumo, sed sub mia klavo:

*- En la domo de Iŝmael mi faris miajn elementajn studojn de Esperanto sub lia aminda kontrolo kaj sub la severa regado de Porto Carreiro Neto, kiu apartenis al la grupo de la plenaj konantoj de la stilo de Zamenhof.*

La kursiva adjektiva propozicio prezentas la verboformon apartenis, kaj la kunteksto estas nesufiĉa por decidi, ĉu temas pri imperfekta preterito aŭ perfekta preterito. En la unua okazo, li estus unu el la grupanoj, dum mi studis sub lia rego, sed en la dua okazo, li ne plu estus unu el ili en tiu sama epoko... Esperanto povas, sed ne emas indiki tion en la propozicio, sed la portugala lingvo estas devigata tion distingi:

1. *Imperfekto: ... que pertencia ao grupo [kiu estis apartenanta].*

2. *Perfekto: ... que pertenceu ao grupo [kiu estis aparteninta].*

Kaj nun, en la fino de mia vivopriskribo, mi nutras mian esperon pri interesataj legantoj, ĉar interesitaj legantoj estas legantoj post la intereso, sekve seninteresaj legantoj: ne plu interesataj legantoj.

*Geraldo Mattos Gomes dos Santos, eksa prezidanto de la Akademio de Esperanto (ĝis 2007)*

**Proverbo:**

***Kia ago, tia pago. Kia vivo tia morto.***

## **RAUL CASTRO VIZITAS MOSKVON**

**UK 2010 okazos en Havano, pro tio pli interesas al ni situacion en Kubo.**

Rusio kaj Kubo redonis energion en iliaj rilatoj, okaze de vizito al Moskvo de Raúl Castro kiu pli koncernis ekonomion ol politikon. Reveno al la alianco de la Malvarmmilitaj jaroj, taksis analizistoj. La kuba prezidanto forlasis Rusion hieraŭ, kie li pasigis semajnojn kaj subskribis serion da ambaŭpartiaj interkonsentoj, pruntedon asigntan de Moskvo al Havano. "Mi pensas, ke via vizito malfermos novan paĝon en la historio de la rilatoj de rusa-kuba amikeco", deklaris la gvidanto de la rusa ŝtato. "Temas pri historia momento", siavice diris Raúl Castro, kies vizito estis la unua vojaĝo de la kuba "Numero unu" al Rusio de dudek jaroj. Rilatoj inter la du aliancoj dum la Malvarma Milito revarmiĝis ekde Raúl Castro estis nomita ŝtatestro en februaro 2008 interŝanĝe por sia frato Fidel, "sed tiuj rilatoj ne povas kompariĝi kun tiuj dum la sovetia epoko, kiam Rusio pelunmis la bezonojn de Kubo", rimarkis la analizisto Jevgeni Volk, de la Fondaĵo "Heredaĵo". La plifortigo de ligiloj kun Kubo estas metodo por Rusio "respondi al Usono" kiu volas starigi kontraŭmisilan ŝildon en Eŭropo, post la jam farita repaciĝo de Moskvo kun Venezuelo, aldonis Sro Volk. Ilustraĵo de la intensa agado disvolvita al Kubo, politikaj gvidantoj, negocistoj kaj eĉ rusaj religiaj eminentuloj iris ĉi tiujn lastajn monatojn al Kubo, antaŭ la oficiala vizito en novembro de Dmitrij Medvedev, la unua en ok jaroj fare de rusa gvidanto. La vojaĝo de Sro Castro al Rusio "pli koncernis ekonomion ol politikon", laŭ membro de politika instituto en Moskvo. La analizisto rimarkas, ke la militista flanko restis "tre malgranda" en ambaŭpartiaj interŝanĝoj, eĉ se la kunlaboro pri defendo inter la du landoj daŭras, multaj ekipaĵoj de la kuba armeo estas de iama sovetia fabriko.



Moskvo kaj Havano ankaŭ decidis "strategian partnerecon", sen specifi tamen ĝuste pri kio ĝi temas. Laŭ la politika observanto, tiu rearmigita rilato tamen "ne estas alianco, sed simple renkontiĝo de komunaj intereso, samkiel estas ankaŭ la kazo kun aliaj landoj". Por Sro Castro, ĉi tiu vizito "estis tre grava ĉar li ne ĝuas internacian agnoskon", kontraŭe al lia frato Fidel, emfazas la analizisto Sro Kremeniuk. La rusa pruntedono al Kubo, kies totala sumo ne estas oficiale konata, "estas grava por Kubo, kiu bezonas la subtenon de

grandaj landoj", li aldonis. En 2006, Rusio decidis halti ĉian demandon pri la malfacila afero de la kuba ŝuldo el la tempo de Sovetunio, tio estas pli ol 20 miliardoj da dolaroj laŭ la Rusoj. Moskvo kaj Havano faris aliajn interkonsentojn, precipe pri manĝaĵ-industrio, fiŝado, kunlaboro en edukado kaj sciencoj, sportoj kaj turismo. Samtempe, la rusa prezidento deziris pliigon de ambaŭpartian komercon, kiu atingis 239 milionojn da dolaroj por la unuaj 11 monatoj de la jaro 2008.

[www.eventeo.net](http://www.eventeo.net)



MURIEL PETIT



Aktiva membro de EBG - Esperantista Brusela Grupo, ŝi eklernis la lingvon en nia grupo mem.